

kructrakforko

- Slava David kontentas pri tiu termino por RailLexic 09392.
- Ludoviko Sekereš rimarkigis, ke gramatika analizo de tiu triradika substantivo povas nur signifi „trakforko de, el, per aŭ por kruco“. Li kaj Jan Werner proponis disigi la triradikan substantivon en adjektivan kaj duradikan substantivon: *kruca trakforko*, *krucaĵa trakforko*, *krucaĝa trakforko*.

unuoble (simple) / duoble liga aŭ unubranĉa / dubranĉa

Por la du specoj de krucaj trakforkoj laŭ simboloj **f**, **g** en TeKu 115, paĝo 2,

- Slava David, Jan Niemann, Jan Werner kaj Heinz Hoffmann preferas: *unubranĉa / dubranĉa*.
- Jan Werner opinias taŭga ankaŭ: *simpla / duobla*.
- La dana grupo opinias taŭga ankaŭ: *unuflanka / duflanka*.
- Ludoviko Sekereš proponas: *unudevia / dudevia*.

trunkvojo

La teksto en TeKu 115, paĝoj 3/4, ke verŝajne RailLexic 09737 kaj 02674 koncernas rektan / grandradiusan kaj malgrandradiusan vojojn en trakforko, ne ĝustas. Ludoviko Sekereš esploris, ke la trafikaj nocioj estas 01036 (france *branche directe*) kaj 01035 (france *branche dérivée*). Tamen la nuna Esperanto-termino por 01036 *rekta vojo* ne estas geometrie ekzakta, ĉar en kurbaj trakforkoj vere rekta vojo ne ekzistas.

En PIV la vorto *rekta* havas 7 signifojn, interalie: **rekta 1** Konservanta ĉiam unu saman direkton simile al streĉita ŝnuro; **rekta 3** Senpera; funkcia sen interveno de perilo. La lasta respondas al la franca *direct*.

Por eviti miskomprenon pri geometrie rekta vojo (laŭ rekta 1), metafora komparo kun arbo (trunko, branĉoj) verŝajne ebligas pli klaran komprenon. La vorto *trunkvojo* inkludas kaj rektan vojon en rekta trakforko kaj pli grandradiusan vojon en kurba trakforko. Ĝi parte respondas al la germana termino *Stammgleis*.



- unuopa termika motorvagono *autorail*
 - unuopa elektra motorvagono *automotrice*
 - motorvagono en fikse kunligita vagonkombinaĵo, egale ĉu termika aŭ elektra *motrice*
- Simila divido ekzistas en la rumana faklingvo:
- termika motorvagono *automotor*
 - elektra motorvagono *vagon-motor*

Sekve, por ebligi klarajn tradukojn inter la tri menciitaj lingvoj, esperantistoj elpensu terminon por *motrice*, francaj kaj rumanaj fervojistoj elpensu terminon por ĝenerala *motorvagono* (egale de kiu speco). Ofte ne estas trovebla aŭ oportuna konciza termino; tiukaze oni vortigu perifrason aŭ uzu koncizan difinon same kiel terminon.

Terminologia Grupo de UIC limigis la sistemigan laboron al la tri lingvoj angla, franca, germana. Tamen, por sufiĉe bona internacia nocio-harmoniigo en la aktuale 20-lingva datumbanko, estas tre avantaĝe kolekti nocioj sistemojn ankaŭ el aliaj lingvoj. Ĝuste pro tio ni alvokas geamikojn de fervojoj kaj lingvo, kunlabori en nia Terminara Sekcio, precipe por serĉi kaj traduki difinojn de traktendaj nocioj en siaj naciaj leksikonoj, normoj, reglamentoj, enciklopedioj. Tio estas grava kontribuo por la UIC-klopodoj, solvebla plej bone fare de IFEF.

Nepre ne supozu ke temas pri laboro nur por specialistoj! Por la sistemigaj taskoj ni prefere traktas bazajn, ĝenerale konatajn nociojn de fervojoj. Interesatoj bonvolu anonci sin ĉe ni.

TERMINOLOGIA SEMINARIO PRI TRAFIKO 2002-11-06/08

Terminara Sekcio de la Faka Komisiono de IFEF iniciatis organizi Terminologian seminarion, kiu okazos senpere antaŭ la Konferenco AEST, nome dum la tagoj de la 6-a ĝis la 8-a de novembro 2002, en la urbeto Dobřichovice (apud Prago).

La seminario ne estas nur por specialistoj pri fervojoj, sed por ĉiuj kiuj havas intereson pri serioza terminologia laboro. Oni prefere traktos bazajn, ĝenerale konatajn nociojn de trafiko. Grava antaŭlaboro por la internaciaj komparo kaj kompreno estas serĉo de difinoj en la naciaj leksikonoj kaj normoj. Ĉi-direkte povas helpi ankaŭ tiuj, kiuj ne estas specialistoj en iu mallarĝa fervoja subfako.

terminlibroj laŭ aktuala stato de RailLexic. Ĉiu volumo enhavas Esperanton kiel unuan, la nacian kiel duan lingvon. Du aliaj uzebloj de la datumbanko estas per kompakta disketo CD-ROM kaj per Interreto. Tio enhavas gravegan devigon: Ni devas montri, ke ni daŭre kapablas kontribui kaj konstante kunlabori laŭ tiu atingita pozicio. La kunlaboro ampleksas du ĉefajn taskojn:

Unue, se UIC decidis pri novaj aŭ prilaboritaj nocioj por la datumbanko, ni ricevas ties difinojn kaj terminojn anglajn, francajn, germanajn. Ni traduku la difinojn kaj proponu, pridiskutu, fine elektu plej taŭgajn Esperanto-terminojn. Tio okazas kaj koresponde kaj dum kongresaj kunsidoj.

Due, la ĝis nun donitaj difinoj tamen venis el iu nacia fonto, sen internacia sistemigo kaj akordigo. Oni ja sciu la fakton, ke en unuopaj lingvoj realo estas multkaze diversnacie dividata. Terminologia Grupo de UIC nun klopodas etpaŝe prilabori unuopajn subfakojn laŭ terminologiaj principoj de Internacia Organizo por Normigo ISO. UIC bonvenigas koncernan kunlaboron de esperantistoj, ĉar planlingva pensmaniero faciligas sistemigon de nocioj kaj kritikon pri naciaj solvoj.

Ekzemplo okulfrappe montranta diversan nacian dividon de realo, koncernas **motorvagonojn**. Laŭ PIV, motorvagono estas surrela transportveturilo provizita per propraj veturrimedoj. Diversaj specoj estas esprimeblaj per aldonaj adjektivoj, ekzemple *elektra ...*, *termika (dizela, gasturbina) ...*, *unuopa motorvagono*. En pluraj naciaj lingvoj ekzistas sama principo. Sed la franca faklingvo enhavas tute memstarajn terminojn por specoj de motorvagono:



Slava David, Jan Werner kaj la dana grupo jesis pri *trunkvojo*. Por la nocio 01035 la nuna termino *devia vojo* estas ekzakta. Tamen, se ni elektas por 01036 arboterminon en metafora senco, oportunas ankaŭ por 01035 same metafora vorto, nome *branĉvojo*.

internenkurba / eksterenkurba

Pri nomi la du specojn de kurbaj trakforkoj laŭ simboloj **c / ĉ**, **d**, la opinioj tre diferencas.

- Jan Werner proponas la pli koncizajn sed malpli klarajn adjektivojn *enkurba / elkurba*.
- La dana grupo proponas simile: *kunkurba / elkurba*.
- Slava David kaj Ludoviko Sekereŝ opinias ne necesa specialan terminon *internenkurba trakforko* - kaj por dekstrabranĉa (simbolo **c**) kaj por maldekstrabranĉa (simbolo **ĉ**). Laŭ ili sufiĉas la du esprimoj *kurba trakforko dekstren* kaj *kurba trakforko maldekstren*. Heinz Hoffmann rimarkigas pri tio, ke por ambaŭ direktitaj internenkurbaj trakforkoj ekzistas la sama ekvacio por kalkuli radiusojn kaj la samaj reglamentaj kondiĉoj pri enkonstruado, permesataj rapidoj ktp. Sekve komuna termino - sendepende de direkto - oportunas en koncernaj fakaj tekstoj. La germana termino estas *Innenbogenweiche*.

Cetere estas diskutinde, ĉu ĝenerale anstataŭ *(mal)dekstrabranĉa trakforko* (01042, 01043) pli oportunas la propono de Slava David: *trakforko (mal)dekstren*.

- Slava David proponas anstataŭ *eksterenkurba* (simbolo **d**) la esprimon *ambaŭflanke kurba*.
- Ludoviko Sekereŝ proponas anstataŭ *eksterenkurba* la adjektivan *simetria*, kvankam tiaj trakforkoj nur tre escepte havas du egalajn radiusojn, do estas vere simetriaj. La germana termino estas *Außenbogenweiche*.

remorka / senmotora vagono

Jan Werner detale traktis la gramatikan problemon *remorko / remorki* el PIV. Ĉar la radiko *remork-* havas substantivan karakteron, la verba derivaĵo *remorki* nur povas signifi „esti remorko“. Sekve la PIV-difino **remorki** Treni post si, kiel remorkon kontraŭas al Plena Analiza Gramatiko.

Do la verbon *remorki* oni eligu el PIV. Ankaŭ ne ekzistu la participoj *remorkanta / remorkata* ktp. Konsiderante tion, la atentigo de franca kolego en Tábor, ke la adjektivo *remorka* estas miskompreniga (ĉu signifas „remorkanta“ aŭ „remorkata“) jam ne estas problemo, ĉar *remorka vagono* nur povas signifi „vagono, kiu estas remorko“.

Post tiu gramatika klariĝo, jen denove principa penso pri la substantivo *remorko*. La fakto, ke en PIV oni limigas la vortuzon je veturiloj trenataj de motorŝipo, biciklo, aŭtomobilo aŭ tramo, montras la intencon nomi per *remorko* nur veturilojn kun suplementa karaktero: Al ĉefa transportveturilo veturanta pleje sole (motorŝipo, biciklo, aŭtomobilo, motortramo), oni (escepte) aldonas duarangan veturilon sen propulsinstalaĵo, por iom grandigi la transportkapaciton.

Ĉe fervojo, vagonoj (plej multaj sen motoro) mem estas ĉefaj transportveturiloj. Ili ne havas suplementan karakteron. Pro tio la vorto *remorko* estas fremdaĵo ĉe fervojo. Tiukaze ni respektu la PIV-difinon, kaj nomu ĉian fervojan transportveturilon *vagono*.

Finfine jen pri la duvorta termino *remorka vagono*: Motivo uzi tiun esprimon ĉe fervojo nur povas koncerni vagonon, kiu estas **kvazaŭ** remorko, ĉar ĝi estas trenata de motorvagono, do tiuaspekte similas al tramremorko. Tiu solvo taŭgas por traduki la francan terminon *remorque (ferroviaire)* (RailLexic 07511).

Restas la konkludo, nomi ĉiun vagonon sen propulsinstalaĵo *senmotora vagono*. Sekve senmotora vagono povas esti aŭ vagono por lokomotivtrakcio aŭ remorka vagono.

La dana grupo kontentis pri tiu solvo.

remorka vagono sen kondukistejo aŭ simpla remorka vagono

La dana grupo kaj Heinz Hoffmann preferas: *simpla remorka vagono*.

terminoj kun la sufikso -um-

Kvankam en Tábor ĉiuj partoprenantoj kontentis pri la terminoj *trakciuma veturilo* kaj *motoruma vagono*, Jan Werner kaj Ludoviko Sekereš ne subtenas tiujn solvojn. Do se ni ne trovos pli taŭgajn terminojn, ni elektu aŭ konservu perifrazojn, ekzemple

- *trakciiloj kaj trakciil-aldonaj veturiloj* por RailLexic 05498 (france *matériel moteur*), kaj
- *vagono de motorvagonaro* por RailLexic 09895 (france *voiture motrice*; germane *Triebzugwagen*).

tendro

Ĝis nun alvenis informoj pri difinoj de la nacilingva termino *tender* el 6 lingvoj:

La nociosistemon a (laŭ TeKu 114, paĝo 4) enhavas la dana, germana kaj rumana lingvoj.

La nociosistemon b (troviĝantan ankaŭ en PIV) enhavas la angla, franca kaj serba lingvoj.

Koncernaj informoj el aliaj landoj estas dezirataj.

Artikolo por INTERNACIA FERVOJISTO

Por varbi novajn kunlaborantojn, artikolo sub la titolo „Terminara Sekcio serĉas kunlaborantojn“ estis sendata al nia redaktoro por publikigo en la revuo INTERNACIA FERVOJISTO (IF). Ĉar eventuale ne ĉiu leganto de Terminara Kuriero regule ricevas tiun revuon, jen la teksto:

Atentemaj legantoj de IF scias, ke en Faka Komisiono de IFEF, apud Fake Aplika Sekcio ekzistas Terminara Sekcio. Sed ni supozas, ke ankoraŭ ne sufiĉaj havas klarajn imagojn pri nuna laboro en tiu sekcio. _____

Jam antaŭ jardeko ĉesis periodo de streĉega laboro por krei kaj eldoni proprajn fervojfakajn vortarojn fare de esperantistoj. Ankaŭ revizio de Plena Ilustrita Vortaro estis finata en 1998, certe por pli ol dek jaroj. Sed feliĉe, jam en 1992 ni ja sukcesis atingi ion, kio antaŭe estis ŝajne utopia revo: Precipe danke al bonaj rilatoj inter nia aktiva hungara landa asocio kaj Hungaraj Ŝtatfervojoj MÁV, nia federacio IFEF ricevis saman rajton koncerne terminologian laboron en Internacia Fervojunio UIC, kiel fervoja entrepreno. Ekde tiam la agado

de Terminara Sekcio tute akordiĝas kun la koncerna laboro en UIC, nome evoluigi la terminologian datumbankon RailLexic. Jam dekomence Esperanto estas datumbanka lingvo samampleksa kiel la naciaj - komence 10, nun 19 lingvoj. La bona kunlaboro IFEF - MÁV ankaŭ ebligas krei kaj eldoni serion de dulingvaj



Interesigu junajn kolegojn